

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 175</i>  <i>majo./2006</i>
	<b>Monata Beletro Revueto en Esperanto</b> <b>Honorita de Premio Grabowski, 1994</b>	
<b>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <a href="http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm">http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm</a></b>		

## Guozhu

### VERDAJ SPUROJ EN 50-JARA MARŜO

— Parolado en la jubilea kunveno pri 50-jara Esp-isteco de Guozhu  
 (Ilustrite per 30 elmetoj de koncernaj Esp-aĵoj)  
 (2006-04-15/05-01)



Mi laboris en fabriko ekde mia 17-a jaraĝo. Sub la cirkonstanca influo, mi havis la kutimon resume ekzameni mian laboron je ĉiu monatfino. Nature mi faris ekzamenan resumon ankaŭ por ĉiu jaro, ĉiu jardeko kaj duon-jarcento.

Estis ĉina antikva verso ke “homo aĝas malpli ol centjara”. Do 50 jaroj estas sufiĉe longa etapo en homa vivo kaj estis rigardata kiel Ora Jubileo.

Per kio mi povas konvinke atesti ke mi lernis Esp-on jam 50 jarojn? Per malnova letero (elmeto 1), skribita de veterano Honfan je 1956-10-22 en

la nomo de ĈEL, respondante al primitiva demando: Kio estas esperanto?

En la historio de la ĉina EM, 1956 estis vere memorinda jaro. En tiu ĉi jaro la nova Ĉinio unuafoje sendis oficialan (trimembran) delegacion al la 41-a UK en Kopenhago. Post reveno al hejmlando, la tri membroj Ĵelezo, Zhang Qicheng kaj Chen Yang, ĉiuj skribis artikolojn pri la “internacia kongreso sen bezono de interpretistoj” kaj pri la mirinda lingvo Esperanto. La artikoloj publikigis en ĉinaj ĉefaj ĵurnaloj kaj gazetoj, ili efikis kiel disŝvebaj verdaj semoj, enradikiĝis en la vastan teron de Ĉinio, kaj ekaperis junaj komencantoj de Esp-o en diversaj lokoj.

Tial, ne nur mi sola, sed estas ankaŭ aliaj kamaradoj kiuj komencis lerni Esp-on ekde 1956.

Mi, Guozhu, distingiĝis inter ili nur per tio ke unue mi estas feliĉa postvivanto kiu daŭrigas persistan lernadon de nia kara lingvo Esp-o seninterrompe dum 50 jaroj ĝis hodiaŭ; ke due mi estas favorata de mia Esp-Asocio kiu volonte aranĝas tian celebron honore al la Ora Jubileo de mia esp-isteco.

Mi ekmemoras pri miaj samgeneraciaj amikoj, ekz-e la talenta Armand Su(1936-1990), fidela Jariĉ(1937-1999), vigla Dai Liming(1941-2005)...k.a. kiuj jam ne havas ŝancon stari sur tia podio.

Mi ekpensas ankaŭ pri aliaj samgeneraciaj amikoj, kiuj laboras fakte pli elstare, sed bedaŭrinde mankas al ili tia favoro okazigi specialan kunsidon far la propra hejmloka Esp-Asocio honore al ili, dume ni fremdlokanoj ja ne rajtas fari tion pretende anstataŭe. Tial mi estas pli feliĉa ol ili, kaj mi havas duoblan devon raporti al vi pri mia laboro dum la pasinta duon-jarcento.

Estas facile kompreneble ke dum la pasintaj 50 jaroj la vetero ne povas resti ĉiam sennuba, ankaŭ la vojo irita ĉiam ebena. Ofte oni devas marŝi sur ŝtonoza pado kaj sub ŝtorma vetero. Grave estu ke ni ĉiam luktu por nia sankta celo kaj ne lasu unu tagon senfrukta.

La vivo de ĉiu homo ja enhavas du partojn: konduti kaj labori.

Kia estas mia esp-ista konduto dum la pasintaj 50 jaroj? Ne indas mia propra komento. Pli indas pritaksoj far aliaj homoj. Okaze de mia 50-jara Esp-isteco, estas vere ĝojinda evento ke publikiĝas la memor-libro “GUOZHU KAJ NI”. Tiu ĉi libro estas vere mirinda, eĉ senprecedenca. Ĉar unue, ĝi estas kompilita per materialoj akumulitaj dum 50 jaroj; due, neniom da materialo estis akirita per intenca varbado. La tuta enhavo estis kompilita el versoj, artikoloj, citaĵoj el privataj leteroj kaj retroŝtaĵoj, el kiuj plejparto neniam publikiĝis, ĉar oni skribis tion neniam kun intenco por publikigo. Sekve ili karakterizas sin vera, fidinda kaj valora.

Miaj laboroj dum la pasintaj 50 jaroj fruktdonis ĉefe je jenaj punktoj:

#### 1. Verki

1.1. 《HU Laŭdas Verdakore》. Estas du versioj de tiu ĉi libro. Jen dulingva eldono de 2003 (elmeto 2). Jen esp-a eldono de 2004 (elmeto 3). Enhavo de tiu ĉi libro estas laŭdoj, ĉefe pri meritohavaj personoj en la ĉina EM, sed ankaŭ pri neĉinaj esp-istoj.

1.2. 《HU Parolas Mal-delire》 (elmeto 4). Por-okazaj artikoloj pri ĉina EM, ne malofte kun malkaŝemaj kritikoj, sekve plejparte en la ĉina lingvo. La unuaj 100 pecoj ellaboriĝis dum malpli ol unu jaro 2000 kaj aperis kiel mesaĝoj en Interreto kaj kolektiĝis en papera eldono. En sekvantaj jaroj mi verkis ankoraŭ pli ol 150 novajn pecojn, sed nun la retpaĝoj de ĉina EM estas pli kaj pli ofte poluitaj, sekve mi turnis min al verkado esperantlingva pri ĉina kulturo ĉefe por neĉinaj revuoj.

1.3. Lastatempe miaj verkoj aperis ĉefe en la 《FONTO》, kies n-ro 266 estis Speciala Numero de HU Guozhu (feb. 2003, 23-a jaro) (elmeto 5). Poste Hubei-a Esp-Asocio publikigis en 2004 dulingvan eldonon de tiu ĉi n-ro (elmeto 6). En junio 2005, 《FONTO》 per duona spaco de la n-ro 294 publikigis mian paroladon “Kial mi amas Esp-on?” en plena teksto (elmeto 7). Cetere, miaj eseoj pri “Li Bai kaj DU Fu en Esp-o”, pri “La Yueyang-turo” kaj “Generalo Chen Jitong”... aperis sinsekve en 《La Gazeto》 (elmetoj 8,9,10).

#### 2. Traduki: esperantigi kaj ĉinigi

##### 2.1. *Strangaĵoj de Liaozhai*

La kompleta esp-igo de la fama novelaro *Strangaĵoj de Liaozhai* de Pu Songling.

Post pli ol 20 jaroj da serioza preparo, ekde la 70-aj ĝis la 90-aj jaroj de lasta jc mi esp-igis la ĉinan majstro-verkon “Strangaĵoj de Liaozhai”, verkita de Pu Songling (1640-1715). Ĉar ne estas eble eldoni mian tradukon, mi enretigis ĝin en interreton. Notinde ke kvankam tiu ĉi novelaro estis tre populara en Ĉinio, kaj aperis jam pli ol 30 tradukoj en 21 fremdaj lingvoj, tamen ankoraŭ troviĝas neniuj kompleta traduko en ajna okcidenta lingvo. Ĉi tie estas du paperaj kolektoj de la unua volumo de Liaozhai en kompleta esp-igo. la unua estas versio de ĈEE (elmeto 11), dum la alia tajpaĵo estas farita de s-ano Begonio per elŝutaĵo de interreto (elmeto 12).

2.2. *Matenaj Floroj Kolektitaj Vespere* de Lusin, esp-igita de Guozhu, eldonita de EPĈ en 1981. (elmeto 13)

2.3. La unua esp-a eldono de 《Poemoj de Li Bai》 enhavas 123 tradukojn de 105 poemoj de Li Bai, el kiuj 66 estis esp-igitaj de Guozhu. La poemaro publikiĝis 1997-06-14 en Japanio. (elmeto 14)

2.4. El ĉina antikva beletro. Krom pecoj en diversaj revuo ekz-e Penseo, Fonto, La Gazeto, Hubei-a Esp-Asocio ankaŭ eldonis libroforme broŝurojn 《Triptiko de Amrakontoj de Tang-dinastio》 (elmeto 15) kaj 《La Senfina Bedaŭro kaj La Bivistino》, la famaj poemoj de Bai Juyi (elmeto 16).

##### 2.5. Ĉinigi/ el-esperantigi

Mi ĉinigis la faman eseon de D-ro Zamenhof 《Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia》 (elmeto 17), kiun eldonis Xinhua Koresponda Lernejo kiel lerno-materialon kaj dissendis al lernantoj.

Mi ankaŭ ĉinigis poemojn el Esp-a poezio kaj publikiĝis dise en diverslokaj Esp-revuo.

La plej nova frukto estas ĉinigo de kroata fabelo 《Wakajtapu》 (elmeto 18).

##### 2.6. Traduka Konkurso (TK)

Tikos iniciatis landskalan aktivadon Traduka Ekzerco en 1978-1980. Mi estis komisiita fari la resumojn por ĝi.

Poste, mi ankaŭ prezidis la rubrikon Traduka Konkurso de “La Mondo”, la organo de ĈEL, dum 1981-1987. Tio estas por mi neforgesebla travivaĵo. Dum dek jaroj mi estis devigata mem studi teorion de traduk-arto kaj resumi spertojn de tradukado, kio donis al mi multe da utiloj, kaj mi ankaŭ ricevis milojn da leteroj de E-lernantoj el diversaj lokoj tra la tuta Ĉinio. Rezulte de tio, mi havis multajn plumamikojn.

### 3. Poezio

#### 3.1. Esperanta Metriko

Mi verkis gvidlibron en la ĉina lingvo *Esperantan Metrikon* kun aparta konsidero por kontentigi la bezonon de ĉinaj s-anoj, ĉi tie estas du eldonoj. La unua estas mimeografita eldono de 1973 en la jaroj de la Granda Kultura Revolucio (elmeto 19) kaj la dua estas tipografia eldono de Huangshi-a Esp-Asocio en 1983. Ambaŭ jam neakireblaj nuntempe. Kaj mi informiĝis ke iu s-ano eĉ mankopiis tiun libron por lerni. La kopiinto estas s-ano Zheng Bocheng, la ĝenerala sekretario de Pekina Esp-Asocio, kiu nun sidas inter ni. Mi mem estas famkonata pro mankopiado de Esp-aĵoj, kaj nun ankaŭ mia libro estas mankopiita de alia s-ano. Pro tio mi sentas honoron.

#### 3.2. Kantoj en Mia Vivo-vojaĝo

Poemoj versitaj en la ĉina lingvo, plej ofte aperintaj en interreto. Jen kolekto ekdonita de la Esp-Asocio de Interna Mongolio en 2002. (elmeto 21)

#### 3.3. Ĉinesko

En 1972 mi prove versis laŭ skemo de ĉinaj fiksfarmaj poemoj kaj fariĝis iniciatinto por enkonduki ĉineskon en la Esp-an poezion.

### 4. Studi

#### 4.1. Esp-Movado en Hubei

Mi studis la historion de EM en Hubei-provinco, kaj verkis Dek Eseojn pri la Historio de Hubei-provinco.

#### 4.2. Esp-Movado en Ĉinio

Mi studis la historion de ĉina EM kaj verkis seriojn da eseoj pri «Ĉinaj Esp-istoj kaj UK», «Kuriozaĵoj de Ĉina EM», «Inkunabla Jarlibro 1932 de Kantona Esp-Instituto» ktp.

### 5. Instrui

Mi kompilis kelkajn lernolibrojn de Esp-o.

#### 5.1. *Aboco de Esperanto* (10 lecionoj)

Tio estis ABC-lernolibro plej vaste uzata unue en urbo Huangshi kaj poste tra la tuta Ĉinio. Estas multaj represaĵoj, ekz-e 1980 en Huangshi (elmeto 22), mimeografita 1980 en Hubei (elmeto 23), mimeografita 1980 de Laborista Kultura Palaco en Shashi (elmeto 24), fotokopiaĵo 1981 en Huainan, represaĵo de Ŝanhaja Esp-Kurso 1982 (elmeto 26). Aparte interesa represaĵo mimeografe eldonita de Wuhan-a Kupraĵa Fabriko en 1981 (elmeto 27), ĉar tre hazarde estas trovita ĝia eldoninto — s-ano Hoikso. Mi donacis tiun raraĵon al li, kun mia bondeziro ke li ankaŭ havu sian Oran Jubileon post jardekoj.

#### 5.2. *Elementa Kurso de esperanto* (20 lecionoj)

Tio estas lernolibro plej ofte uzata en Koresponda Esperanto-Kurso (KEK) kun multaj eldonoj (elmeto 28) kies eldon-kvanto nombris almenaŭ pli ol 30 mil ekzemplerojn (30 mil verdaj semoj), poste ĝi estis oficiale eldonita de ĈEE 1992 en Pekino (elmeto 29)

#### 5.3. Internacia Ekzameno (IE) de UEA/ILEI

En 2004, dum la 89-a UK en Pekino, okazis Internacia Ekzameno de UEA/ILEI, kun sep-membra Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) el sep landoj. Guozhu funkciis kiel komisionano, unika el Oriento, kaj ankaŭ la unua ekzamenanto el Azio en UK dum la historio de IE.

### 6. Redakti

#### 6.1. revuoj

Mi funkciis kiel redaktoro de la revuoj Nova Floro (1980-1989), Penseo (1997-1999)

